## La demando pri senc-havaj numeralnomoj

Min delonge maltrankviligas la fakto, ke la difinoj de la numeraloj post miliono aperas en la Esperantaj vortaroj dusignife. Tiel aperas la difinoj de tiuj numeraloj ankaŭ en la etnolingvaj vortaroj kaj enciklopedioj. Pro tio mi tralegis kun granda intereso la artikolon "Senco-havaj numeraloj" de *Aleksander Kerbel*, Israelo, en n-ro 1 (69) por januaro 2007 de "Scienco kaj Kulturo". En ĝi la aŭtoro fakule deklaras, ke la numeraloj, prezentantaj en PIV nombrojn pli grandajn ol mil estas konfuzaj, ĉar ili aperas dusignife. Li tamen erare limigas al mil anstataŭ al unu miliono.

Por la skriba prezento de la nombroj li proponas apliki la sciencan sistemon, prezentatan per la formulo $10^N$ (legu: la N-a potenco de dek). En tiu ĉi sistemo $10^0 = 1$ (la nula potenco de dek estas unu) kaj $10^1 = 10$ (legu: la unua potenco de dek estas dek), $10^2 = 100$ (legu: la dua potenco de dek estas cent). En tiu ĉi sistemo la nombro 1.000.000 aspektas tiel: $10^6$ (legu: la sesa potenco de dek). La scienca sistemo ne ebligas ambiguecon, sed ĝi ne estas aplikata en la ĉiutaga praktiko. Tie estas aplikata la vorta sistemo.

La nuna vorta sistemo rezultigas grandegajn miskomprenojn. Mi konas okazon, en kiu bulgara aŭtoro, kiu ne sciis, ke en Usono biliono signifas miliardon, uzis "bilionon" kun la akceptita en Bulgario signifo (1000 miliardoj). S-ro *Kerbel* tamen ne proponas vortan sistemon, en kiu la dusignifeco de la nombroj pli grandaj ol unu miliono estu eliminita. Laŭ mi la solvo de la problemo konsistas en la akcepto de unueca vorta sistemo por la tuta mondo. Tio signifas akcepti la eksan angla-germanan sistemon, laŭ kiu biliono estas miliono da milionoj $10^{12}$ (mil miliardoj), kiu estas logika.

La nuna situacio devas ne plu daŭri en la epoko de la rapida tutmondiĝo. Sed ĉu eblas estigi unuecan sistemon por la tuta mondo? Mi opinias, ke eblas. Jam estas multaj ekzemploj de akcepto de unuecaj sistemoj en diversaj sferoj: la transiro al la decimala sistemo, kvankam ankoraŭ ne kompleta, la akcepto de la landkodoj kaj de la kodoj pri la landaj valutoj laŭ la normo de ISO 3166 de la Organizo por normigo. Necesas nur iniciato. Tia povus eliri el UEA, kiu estas en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko. Sed por tio devas esti farita propono. La plej kompetenta faka organizaĵo por la propono estas ISAE.

*Dimitar HAĜIEV*, Bulgario
<dimitur_hadjiev@yahoo.com>





## Ankaŭ "Tempo" festis rondcifere

Fine de januaro 2009, "Tempo", la plej bone konata papera poŝtuko festis sian 80-an naskiĝdatrevenon. Ekde 1929 tiu ĉi marko akompanas homojn en la vivo, en la ĉiutaga laboro kaj memkomprene okaze de malvarmumo, kiam malsekiĝas la nazo. "Ĉu vi eble havas 'Tempon'?" Tiu ĉi demando multon malkaŝas pri la signifo de la mondomarko: ĝi estas simptomo por tuta produktogenro kaj havas konatecgradon de preskaŭ 100% – rimarkebla sukces-historio. Ekde 80 jaroj ĉiam ĉeestas "Tempo" – por nazopurigado, por larmosekigado, por malpuraĵmakul-forigado... (*reform rundschau*, marto 2009, p. 15)

## Sano per nuksoj

Aĝaj homoj ofte suferas pro la "metabola sindromo", t.e. korpa tropezo, alta sangopremo, altaj sangaj grasec-valoroj kaj alta sangosukereco. Hispana studo kun 1224 partoprenantoj pli-ol-52-jaraĝaj nun montris, ke nutrado per olivoleo, plantaj manĝaĵoj kaj nuksoj (30 gramojn ĉiutage) bridas la sindromon kaj eĉ povas ĝin malaperigi.

(*reform rundschau*, marto 2009, p. 15)

## La "verda Maŭricio" – ĉu temas pri poŝtmarko, pri palmo, pri perlo?

Eĉ pli malofta ol ĝia blua poŝtmarkofratino estas la maŭricia palmo *Hyphophorbe amaricaulis*. La lasta ekzemplero de sia specio kreskas en la botanika ĝardeno de *Curepipe* (Kurepipo) sur la hind-oceana insulo Maŭricio. Ĝi havas 12 m altan grizan trunkon kaj la speciotipajn malmultajn ventumilformajn foliofrondojn kun po 100 ĝis 150 v-forme metitaj pinataj folioj. Laŭ parencaj *Hyphophorbe*-specioj, kiel ekz. la spindelopalmo kaj la botelopalmo, ĝi diferenciĝas de ili pro sia nevolbita, rekta trunko. La infloreskoj elkreskas sube de la kronbazo el la trunko.

Bedaŭrinde la masklaj infloreskoj sin malfermas antaŭ tiuj de la femalaj kaj ne povas ilin poleni – pro tio ĉiuj semoj estas sterilaj. Jardekdaŭraj klopodoj pri novgeneracio estis vanaj, ĉiuj klonitaj plantidoj senescepte formortis. Fiaskis ankaŭ la provoj fekundigi femalajn florojn pere de frostkonservitaj masklaj semoj. Se ne okazas miraklo, la kurepipa botanikĝardena ekzemplero de *Hyphophorbe amaricaulis* estas la lasta de sia specio... (2009-06-15)